

Augustin Wibbelt,

La maljuna pastro

tradukita de Manfred Retzlaff

Predikon grandan tenis li,
Predikon pri la mond';
Kaj kiam tiun finis li,
Ne plu aŭdiĝis vort'.

Kaj finis li per tio, ke
Neevitebla estas sort':
Li mem ja ne eskapos kaj
Forprenos lin la mort'.

En helan la sunbrilon nun
Li venas el la sakristi',
Lin premas lia propra vort':
Ĉu la unua estos li?.

La tombo-psdon en trankvil'
Laŭlonge iras li -
Sinjoro kara, baldaŭ vi
Alprenos min al vi.

La vojo estis longa ja,
Kaj laca estas mi,
La ŝuoj eluziĝis, do
Min prenu, kara Di'!

...

Ĉe la tombeja pordo jen
Staranta restas li,
Kaj zumaa abelaro en
La branĉoj de tili'.

Eliras li el la tombej' -
Vivado ĉie ĉi!
“Mi pensas”, diris li, “Sinjor’,
Ne urĝas jam al mi.”

*Traduko de la Basgermana poemo “De aolle Pastor” de AUGUSTIN WIBBELT (*1862-09-19 – †1947-09-14) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2012-10-28.*

Arg-635-1280 (2012-10-29 12:53:43)

Ich, Manfred Retzlaff, fand dieses Gedicht in dem Heft “Kleine Westfälische Reihe”, Nr. VI/12, erschienen im Jahre 1957 in dem Gemeinschaftsverlag “Aschendorffsche Verlagsbuchhandlung” und “Deutscher Heimatverlag Ernst und Werner Giesecking”, herausgegeben von Wilhelm Brockpähler, Hans Riepenhausen und Hans Thiekötter.